

# La letero de l' *Akademio de Esperanto*

N° 5 - oktobro - novembro - decembro 1988

ISSN 0986-1181



La unua asembleo de la asocio "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto" kunvenis en Parizo la 25-an de Septembro ĉe la sidejo de la Unuiĝo Franca por Esperanto (U. F. E. ).

Ĝi faris bilancon pri la unua jaro de ekzisto de tiu asocio.

Ĝia situacio estas tiu de nova asocio; la situacio de ĝia organo, "La Letero", tiu de bulteno dum sia lanĉo-periodo: jam 80 Esperantistoj el 13 landoj deziris forte ĝin subteni kaj aliĝis; 112 deziris legi "La Leteron" kaj abonis. Tio ebligis al ni sendi nian organon al ĉirkaŭ 2000 adresoj, inter kiuj la redakcioj de konataj naciaj kaj internaciaj publikaĵoj. La nombro da paĝoj de "La Letero" kreskis ekde la lasta numero de la unua jaro de 4 al 8. Dank'al novaj abonantoj kaj membroj tio estos la minimumo en la dua jaro. Sekve tio ebligos la publikigon de pli longaj kaj pli interesaj kontribuoj.

Ĝis nun aperis kontribuoj de nur kvar Akademianoj. Montriĝas, ke nun pliaj deziras aliĝi al tiu eta skipo. Montriĝas ankaŭ, ke aliaj aplaudas al niaj klopodoj. Ekzemple, Profesoro Humphrey Tonkin, prezidanto de U. E. A. kaj membro de la Akademio, malgraŭ siaj multaj taskoj kaj laboroj, speciale skribis al ni, ĉar li trovis tute interesa la enhavon de la lasta numero de "La Letero".

La diversaj raportoj estis aprobitaj, unuanime kun unu sindeteno. La tri elirantaj konsilianoj \* estis reelektitaj. La asembleon sekvis Komitata Kunveno, en kiu diversaj planoj por la estonteco estis serioze pridiskutitaj. Vi certe baldaŭ aŭdos pri unu el ili; espereble antaŭ la apero de la proksima numero. Sed restas multo farendi! Ni ĝin faros! Subtenu nin! Reabonu! Reaniĝu!. Trovu novajn, ankoraŭ novajn, ĉiam novajn!

André ALBAULT

\* D-ro André Albault, Michel Audibert, Marie-Thérèse Boiton

# OFICIALAJ INFORMOJ de LA AKADEMIO de ESPERANTO

Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L.ZAMENHOF en 1905-

## K O R E O

### I. Faktoj.

Ni konstatas, ke

a) en gravaj dokumentoj (Mondmapo, poŝatlaso, P.I.V.) estas uzataj la landnomo Koreo kaj ĝia derivaĵo Koreano.

b) en la protokolo de la 3-a Kunsido de la "Lingva Komitato de KEA" (Korea Esperanto-asocio), kiu okazis la 9-an de Aprilo 1984 estis alprenitaj decidoj. Ni citas:

1. "La esperanta landnomo de nia lando " Dehanminguk" estas Koreujo".
2. " La esperanta gentnomo de nia gento estas koreo."

### II. Rimarkoj

a) La "decidoj" de KEA nek estis prezentitaj al la Akademio, nek sankciitaj de ĝi. Ili ne povas esti precedentoj por similaj decidoj nek esti oponitaj al decidoj de la Akademio.

b) La kontrasto inter punktoj a kaj b de § I montras, ke ni troviĝas en tipa kazo antaŭvidita de la 2-a rekomendo pri landnomoj; estas konflikto inter la kategorioj por unu sama nomo. Sekve por decidi ĉu Koreo nomas landon aŭ homon ni devas obei la 15-an regulon de la Fundamento.

### III. Internacieco

Ni konstatas,

a) ke ekzistas monda internacieco por la landnomo \*Kore-:ĝi koncernas ne nur la Latinidajn, Germanidajn kaj Slavajn lingvojn kune kun la ceteraj Eŭropaj, sed ankaŭ la Sanskritidajn kaj la Iranajn, ankaŭ la Afrikajn kaj Aziajn kiel ekz-e la Indonezia. Ĉiuj devenas de la nomo de Korea dinastio "Gaoli" pri kiu raportis Marco POLO.

b) la sama nomo Gaoli estas plu uzata en kelkaj lingvoj Aziaj: nome, en la Ĉina Gaoli kaj en la Taja: Kaoli.

c) La Koreanoj apartenas al unu sola etno, kiu nomiĝas sialingve: Han. Sur la bazo de tiu nomo la Sud-Koreanoj nomas sian landon ordinare: Hangug t.e. "Hanlando", vorto kiu povus utili kiel sinonimo. Japanoj imitis tiun nomon per: Kankoku.

### IV. Konkludoj

a) La formo Koreujo estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas Koreo kaj ties anoj estas Koreanoj.

b) Ne povas esti oponita al tiu konkludo la fakto, ke unuece ĉiuj diras Japan-ujo/-io kaj Ĉin-ujo/io. Al ili estas aplikebla la rekomendo 1-a; cetera tie la internacieco ne estas unueca, nek monda. Ankaŭ ne eblas oponi la fakton ke oni diras Franc-ujo/io por la Franca France: temas pri vorto de la Fundamento kaj estas egaleco inter la internaciecoj de \*Frans- kaj de \*Franci- por la landnomo.

c) Nur tiel ni povas retrovi la unuecon de nia lingvo.

### Pravigantaj dokumentoj

Etimologio. Gaoli en la Korea. La fonologio de la Korea montras la ekziston de tri serioj de konsonantoj: a/ mildaj senvoĉaj b, d, g ...; b/ fortaj: bb, dd, gg (valorantaj niajn b, d, g ); spiraciaj: p, t, k (valorantaj fonemojn kiujn ni reprezentos per ph, th, kh ). Aliparte ekzistas nur unu likvida fonemo, kiun ne-Koreanoj aŭdas jen kiel l, jen kiel r. Marco Polo ne havis alian rimedon ol prononci ion similan al Kaori...

Monda internacieco (enketo super pli ol 45 lingvoj- 3/4 de la Homaro).

### Latinidaj lingvoj

F. Corée-Coréen  
H. Corea-Coreano  
I. Corèa-coreano  
Kt. Corea-Coreà  
Oc. Couréo-Courean  
Rc. Corea-Corean  
Rn. Coreea-Coreean

### Aliaj Eùropaj

Gk. Korea-Koreatus  
Li. Koréja-Koréjietis  
La. Koreja-Korejiesi  
Bn. Korea-Koread  
Ir. An Choire-Muinti  
Fn. Korea-Korealainen  
Hg. Korea-Koreai  
Tk. Kore-Koreli  
Vk. Korea-Koreano

### Ĝermanidaj lingvoj

A. Korea-Korean  
G. Korea-Koreaner  
Nl. Korea-Koreaan  
Ak. Korea-Koreaan  
Dn. Korea-Koreaner  
Ng. Korea-Koreaner  
Sv. Korea-Korean

### Ŝemidaj/Sanskritidaj...

Ab. Kurya-kuri  
Hb. Qorea-qorei  
Hd. koriya-koriyan  
B. koria-korian  
Sh. koriyava-koriyanu  
Ps. koreh-korehi

### Slavaj lingvoj

R. Korea- Koreec  
Bg. Korea- koreec  
Br. Kareja- kareec  
Uk. Korea-koreeci  
Ch. Korea-Korejec  
Sk. Korea- Korejčan  
Kr. Koreja-Korejac  
Sn. Koreja-korejec  
Ekstrem-Orientaj

### Afrikaj lingvoj

Sw. Korea-Mokorea  
Ll. Korea-Mokorea

### Rimarkoj

- a) La grafemika transliterigo (Slavaj lingvoj, la Greka, la Ŝemidaj kaj la Sanskritidaj) estas klarigita en: "LI KAJ MI".
- b) La gentonomo de la Koreanoj, Hano (el Ko. han) havas nenion komunan krom ekstera formo, kun la nomo de la ĉefa gento de Ĉinujo, kiu devas esti en E-o: Hano (laŭ la prononco de la Ĉina han).
- c) Estas notinde ke eĉ Koreanoj konas la nomon Korea, se nur pro tio ke sufiĉe multaj poŝtmarkoj de tiu lando, krom surskribaĵoj en la Korea alfabeto, surportas ankaŭ la Latinalfabetan vorton Korea: tiu estas ja multlingva...
- d) Hazarde estis trovita en la gazeto "Lingvo Internacia" de 1904 la landnomo "Koreo".

\*\*\*\*\*

## E G I P T O

### I. Faktoj.

Ni konstatas, ke

- a) en la grava traduko de "La Faraono" de Prus (KABE 1907-1908, reeldono en 1957) nia plej eminenta tradukisto konscie kaj konstante tradukis la Polan Egipt per Egipto. Ne eblas nei, ke tiu traduko apartenas al nia literatura tradicio kaj kune kun ĝi la landnomo Egipto.
- b) en la ĉiutaga tradicio oni uzas la formojn "Egiptujo" aŭ "Egiptio".
- c) iuj volus distingi inter la malnova antikva Egiptujo kaj la hodiaŭa Egiptio, eble loĝata de Egiptianoj.

### II-Rimarkoj.

- a) La distingo inter Egiptujo kaj Egiptio malfaciligus la lingvon kaj eĉ la komprenon. Cetere la antikvaj Egiptanoj nomis sian landon Kemet, kiu povas liveri la nomon Kemeto "Nigra Tero"); ili havis ankaŭ diversajn bilajn nomojn, kiel ekzemple, Novhi - Kah ("Sikomor-Tero"); k.a., ĉiuj nomantaj la landojn.
- b) La kontrasto inter punktoj a) kaj b) de § 1 montras, ke ni troviĝas en tipa kazo antaŭvidita de la 2-a rekomendo pri landnomoj; estas konflikto inter la kategorioj por unu sama nomo. Sekve por decidi ĉu Egipto nomu landon aŭ homon, ni devas obei la 15-an Regulon de la Fundamento.

### III-Internacieco.

- a) Ni konstatas, ke ekzistas monda internacieco por la landnomo \* Egipt-: ĝi koncernas ne nur ĉiujn Eùropajn lingvojn, sed ankaŭ ĉiafamiliajn lingvojn tra la mondo. La etimo estas, tra la Latina AEgyptus kaj la antikva Greka, la Egipta urbonomo Haj-Hu-Phtah, almenaŭ laŭ la plej probabla hipotezo de la specialistoj.

.../...

b) La malmultaj lingvoj ( Hinda, Bengala, Persa, Turka, Araba, Hebrea, Indonezia, Svahila...) kiuj uzas alian nomon, uzas unuanime la landnomon \*-misir aŭ variantojn de tiu.

c) En ĉiuj lingvoj la nomo de la ano estas derivita ( Egipt-an; misir-an)

#### IV-Konkludoj

a) la sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la landnomo Egipto; ties anoj estas Egiptanoj.

b) obei la Fundamenton estas ankaŭ omaĝi al nia granda verkisto kaj tradukisto KABE, de sia plena nomo Kazimierz BEIN. Lia traduko estas ankoraŭ aktuala.

c) nur tiel ni povas retrovi la unuecon de nia lingvo ankaŭ en la tempo.

#### Pravigantaj dokumentoj

##### Bibliografio:

Boleslaw PRUS. La Faraono. El la Pola trad. KABE (Kazimierz BEIN). Eld. Polonia, Varsovio, 1957. 4-a eldono. 3 volumoj (entute) 961 paĝoj.

CHAMPOLLION. Principes généraux de l'écriture sacrée égyptienne (1836). Ré-édition 1894, Institut d'Orient, Paris.

Rim.: ne aperis similvalora verko kiel la traduko de KABE pri la lando Egipto; la solaj esceptoj valoraj estis artikoloj en la revuo "Literatura Mondo". Sed ili uzis la landnomon Egipto.

Monda internacieco (Enketo super pli ol 45 lingvoj- 3/4 de la Homaro)

| <u>Latinidaj lingvoj</u> | <u>Germanidaj lingvoj</u> | <u>Slavaj lingvoj ( u =i)</u> |
|--------------------------|---------------------------|-------------------------------|
| F. Egypte-Egyptien       | A. Egypt-Egyptian         | R. Egupet-eguptanun           |
| H. Egipto-egipcio        | G. Agypten-Agypter        | Bg. Egupet-eguptanun          |
| I. Egitto-egiziano       | Nl. Egypte-Egyptenaar     | Br. Egipet-egipcjanin         |
| P. Egipto-egipcio        | Ak. Egipte-Egiptenaar     | Uk. Egupet-Eguptanun          |
| Kt. Egipte-Egipci        | Dn. Agypten-Agypter       | Ch. Egypt-Egyptan             |
| Oc. Egipto-Egyptian      | Ng. Egypt(en)-egypter     | Sk. Egypt-Egyptan             |
| Rc. Egipta-Egipcian      | Sv. Egypten-egyptier      | , Kr. Egipet-Egipcjanin       |
| Rn. Egipt-Egiptean       |                           | Sn. Egipt-Egipcjan            |
|                          |                           | Pl. Egipt-Egipcjanin          |

| <u>Aliaj Eŭropaj lingvoj</u> | <u>Ŝemidaj/Sanskritidaj</u> | <u>Ekstrem-Orientaj</u> |
|------------------------------|-----------------------------|-------------------------|
| Gr. Aigvptos-Aigvptios       | Ab. miŝr-miŝri              | C. Aiji-Aijiren         |
| Li. Egiptas-egiptietis       | Hb. micrajim-micri          | J. Eziputo-Eziputozin   |
| La. Egipte-Egiptiesi         | Hd. misr-misri              | Ko. Ijibtü-Ijibtüsaram  |
| Bn. Bro-Ejipt-Ejiptad        | B. miŝar-miŝori             | Tj. Ijipt- chao Ijipt   |
| Ir. An Egipt-Egipteach       | Sa. ĝiptuva-ĝiptuvarayā     | In. Mesir- orang Mesir  |
| Fn. Egypti-Egyptiläinen      | Ps. meŝr)meŝri              |                         |
| Hg. Egiptom-Egiptomi         |                             |                         |

|                      | <u>Afrikaj lingvoj</u>  |
|----------------------|-------------------------|
| Tk. Misir-Misirli    | Sw. N' Gipto- mwingipto |
| Vk. Egiptoa-Egiptoar | Ll. Gipto- mongipto     |

#### Rim.

a) La grafemika transliterigo de la Slavaj lingvoj (Rusa, Bulgara, Belo rusa kaj Ukrainaj), de la Greka, de la Ŝemidaj (Araba kaj Hebrea), de la Hindiaj (Hinda, Bengala kaj Sinhala) kaj de la Iranaj (Persa) estas klarigita en la kolektiva verko " Li kaj Ni".

b) Zamenhof en " La Revizoro" ŝajne cedis al KABE uzante: Egiptano.

e) PIV per citado el KABE iafaje uzas la landnomon Egipto. Ekz-e, ĉe koridoro: Egipto estas koridoro inter du montoj.

d) La landnomo Egipto aperis en "Lingvo Internacia" almenaŭ jam en 1908; la vortaro de BOIRAC (1909) ĝin citas; "Literatura Mondo" (1924...) ĝin uzas...

\*\*\*\*\*

# KRONIKO de la NUNTEMPO

## LINGVO-NORMO KAJ LINGVO-SENTO



Skribis leganto " *La numeraloj de unu ĝis mil estas regulaj, vere science elpensitaj numeraloj disde la aliaj supren (miliono, miliardo) kiuj estas nescience elpensitaj aberaciaj neregulaĵoj*". Kaj tuj li dekretis la neceson ŝanĝi tian "abercion" per la ekuzo de novaj "regulaj" terminoj: *miljon, biljon, miljard...* Jen tio ĉi memorigas alian "samideanon", kies harfendata ĉevaleto estas la interpunkcio, kaj li batalas

kontraŭ la majuskligo de la monato-nomoj, kvankam ĉio ĉi estas ja Zamenhofa uzado! Li emas korekti eĉ Akademian decidon, anstataŭigante la verbon "povas" (kun la senco: havas la eblecon fari) per la verbo "rajtas" (kies valoro estas strikte jura). Alia "samideano", recenzinte libron, deklaris, ke li ne ŝatas tiun vorton, ĉar ĝi tro similas la francan, de kiu ĝi devenas! - nek tiun alian vorton, ĉar ĝi tro similas la germanan, de kiu ĝi devenas! - nek ankaŭ tiun alian, ĉar ĝi tro akre tiklas lian lingvo-senton! Same atenta ekzameno de la faritaj lingvo-demandoj ofte montras ian konfuzon inter la nocioj de lingvo-normo kaj lingvo-sento.

La lingvo-normo, kiel kolektiva lingvo-konscio, estas la nature socia konvencio, kiu kun la tempo fariĝas tradicio simila al jura kutimo (cetere kun reguloj kaj leĝoj ne ĉiam plene konsciaj por la uzantoj), tradicio do bremsanta la evoluajn tendencojn kaj dank'al tio certiganta minimuman stabilecon por la ĝenerala komunika interkompreno. En Esperanto ĉi tiu tradicio rezultas el la FUNDAMENTO, la uzado de rekonitaj bonaj aŭtoroj kaj la Akademias decidoj, ĉar - kiel skribis Prof. Geraldo Mattos - " *la kutimo estas pli grava ol logiko*". Tial la Akademio ne ekzistas por enkonduki novajn vortojn nek por modifi la jam uzitajn: ĝia tasko estas konservi kaj protekti, ĉefe kontroli kaj averti kontraŭ ĉio, kio povus deflankigi la lingvon disde ties Fundamenta unueco. Skribis D-ro L.L. Zamenhof: " *La Lingva Komitato estas kreita, por malpermesi ĉiun entreprenon, kiu povus malutili al la unueco de nia Lingvo*".

La lingvo-sento, kiel individua lingvo-konscio, respondas al personaj gustoj, kies preferoj kondukas al propraj aŭtoraj stiloj, kiuj stiloj mem pere de la literaturo konsistigas siavice evoluajn fontojn de la estonteco. Necesas ne preni por normo tion, kio restas nur preferata propra uzmaniero! Bedaŭrinde tro multaj en Esperanto emas nun konfuzi ambaŭ faktorojn: nur ilia propra lingvo-sento sin trudas kiel la sola lingvo-normo!

J.T.

° " *La logikeco de Esperanto*", artikolo aperinta antaŭ ne longe en la nova revuo: " *LINGVA*".

### OPINIO DE LEGANTO

De Meksiko skribis al ni S-ro Enrique Lemus Rodriguez, redaktoro de la bulteno de la "Universitata Asocio por Internacia Lingvo" :

*...Jam de longe oni ne posedis informojn pri la Akademio... Por ni la graveco kaj neceso de via bulteno estas eksterduba. Restas nenio ol fari unu aferon: gratuli vin!... Ni konsideras necese fari ĉion eblan por la subteno kaj kreskigo de via bulteno!... Ni volas amplekse informi pri via laboro en nia bulteno ""Universitato kaj la Internacia Lingvo"... Ni ja "volas lingvon interne pli fortan, pli belan". Ni estas kun vi. Persistu!"*.

Jen kio, klara per si mem, ne bezonas komenton.

\*\*\*\*\*

## PRI LA NOMOJ DE MONATOJ KAJ TAGOJ...

Nin atingis letero el Usono; ĝi subtenas la klopodon de nia Japana amiko, al kiu la redakcio de "Esperanto" donis grandan reklamon! Certe prave, ĉar al neniu sincera homo estu malpermesite diskuti pri punkto aŭ alia: nenio estas tabua!

Tamen unue necesas serĉi la plej akcepteblajn formojn. Nome, la sufikso - ato jam havas du gravajn signifojn en nia lingvo (participa, kemia) kaj ekzemple triato unuafoje renkontita ne elvokos la ideon de monato; oni prefere ekpensos pri la kemiaĵo. Des pli, ke plej ofte, laŭ la ĝusta rimarko de nia Japana amiko, la monatoj aperas hodiaŭ nur en la dat-kodoj; la monatonomoj cetere aperas nur en poezio!

Mi demandas al mi kaj al vi ĉu -embro ne multe pli bone sugestus la monatojn. Jam tri monatonomoj finiĝas per -embro (Septembro, Novembro, Decembro). Tiel do ni kreus dekdu raciajn neologismojn: de unembro (-Januaro), duembro, ĝis dek-embro, dekunembro, dekduembro... Ili certe ne estus konfuzeblaj kun io alia.

Ni en ili elizius unu al un, laŭ la rimarko en AKTOJ DE LA AdE, II, p.39.

Por la tagoj ni konsiderus, ke jam kvin nomoj finiĝas per -o kaj do proponus la sep nomojn undo, (=lundo!), dudo, ... sesdo, sepdo.

Jen do dudeko da novismoj. Sed kiu subtenos ilin (aŭ tiujn de nia Japana amiko) kaj trudos ilin al ĉiuj? Ĉu ili fariĝos uzataj kaj do iam povos esti sankcie agnoskitaj en vortaroj, poste de la Akademio mem? Aŭ ĉu ili restos kiel intelekta ludo en angulo de nia Letero? kiu vivos, tiu vidos! Do, ni sidu kaj vidu!

## KAJ NOMOJ POR ALFABETAJ LITEROJ

Samloke, "Esperanto" reklamas por novaj nomoj por alfabetaj literoj. La propono venas de amiko el Israelo. li citas plurajn tiajn proponojn. li forgesis unu gravan, aperintan en "Scienca Revuo " (17,2,66) sub la titolo "Teknika alfabeto". Mi donas ĝin ĉi-sube:

|     |     |     |    |      |     |       |     |
|-----|-----|-----|----|------|-----|-------|-----|
| a   | ba  | ce  | ĉo | dal  | e   | if    | go  |
| ĝim | haŝ | ĥet | i  | jot  | ĵe  | ka    | ul  |
| om  | an  | o   | pe | ku   | er  | es    | ŝa  |
| tit | u   | ŭo  | ve | bive | iks | igrek | zet |

Tiuj nomoj ne povas esti konfuzitaj kun Grekaj literonomoj nek kun propozicioj aŭ aliaj Esperantaj vortetoj; ili maksimume similas al la internaciaj nomoj (elmontritaj de Belinfante), kondiĉe ke ili respektu la indikojn donitajn de la eksperimento pri aŭda komprenebleco de Radio Roma (ROELOFS : "Scienca Revuo ", 12, p.58). La novaj nomoj estas parte pruntitaj de aliaj alfabetoj ( Rusa, Araba, Hebrea, Armena ). Se Esperanto estus vaste uzata en tekniko kaj science ankaŭ parole, ne estas dubo, ke oni eksperimentus tiujn nomojn de literoj, kiuj inkludas ne nur la ĉapelitajn literojn sed ankaŭ la Latinajn literojn q, w, x, y . Manke de tia uzateco, tiuj nomoj ne povas eniri en vortarojn, ankoraŭ malpli en lazorgoj de la Akademio.

Cetere, ĝi nun havas pli gravajn aferojn antaŭ si !

A. A.

## NI FUNEBRAS

La 23-an de septembro 1988 en SUBOTICA (Jugoslavio) okazis la entombigo de la Akademiano Tibor SEKELJ (1912-1988 ).

Magistro de sciencoj pri muzeologio kaj profesie direktoro de muzeo, li estis konata ankaŭ kiel vojaĝanta geografo kaj verkisto. Esperantisto ekde 1929 li ĉiam sciis kunligi sian profesion vivon kun strebo por la Lingvo Internacia.

## INTERNACIAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO

Dezirante kompari la Francan lingvon kun aliaj "internaciaj lingvoj" Franca aŭtoro listigis ses parametrojn laŭ li "agnoskitajn" \*. Li proponas listeton de 10 naciaj lingvoj internacie uzataj el kiuj ses estas la oficialaj lingvoj de UNO. Por ĉiu lingvo li atribuas por ĉiu parametro unu, du, tri aŭ neniu stelo laŭ lia takso de la koncerna graveco.

Ni reproduktas lian tabelon ĉi-sube.

|              | nombro<br>de<br>parolantoj | geografia<br>disesteco | homa<br>varieco | pedagogia<br>disvastiĝo | literatura<br>riĉeco | teknologia<br>"potenco" |
|--------------|----------------------------|------------------------|-----------------|-------------------------|----------------------|-------------------------|
| La Angla *   | **                         | ***                    | ***             | ***                     | ***                  | ***                     |
| La Franca *  | *                          | **                     | **              | ***                     | ***                  | *                       |
| La Hispana * | **                         | **                     | *               | **                      | ***                  | *                       |
| La Rusa *    | **                         | **                     | *               | *                       | ***                  | ***                     |
| La Germana   | *                          |                        |                 | *                       | ***                  |                         |
| La Araba *   | **                         | **                     | *               |                         | ***                  |                         |
| La Cina *    | ***                        | *                      | *               |                         | **                   |                         |
| La Portugala | *                          | **                     | **              |                         | **                   |                         |
| La Japana    | *                          |                        |                 |                         | **                   | ***                     |
| La Itala     |                            |                        |                 | *                       | ***                  | *                       |

La asterikso ĉe ses lingvo-nomoj montras, ke temas pri oficiala UNO-lingvo .

Franco establis tiun liston kaj evidente vidis tion tra Francaj prismoj. Aliflanke tre certe alinaciano plej ofte atribuas la saman nombron da steloj. Ĉiokaze ni mem rigardos tiun liston tra Esperantistaj prismoj kaj havos aliajn opiniojn. Ni plej unue kritikos, ke mankas du aliaj kolumnoj: unu pri la facileco de la lernota lingvo kaj unu pri ĝia neŭtraleco. Nu! la aŭtoro antaŭrespondas al la unua kritiko. Por li povas temi nur pri la facileco de la Angla kompare al la Franca. Kaj pri tio li aldonas: "Koncerne la karakteron pli-malpli "facilan" de la lingvoj, oni permesos neniel kalkuli pri ĝi". li verŝajne opinias, ke se iu volas lerni lingvon, li ne rigardas tiun aspekton de la afero. Cetere, se la Franca estas malfacila pro sia gramatiko kaj sia sintakso, la Angla pekas pro sia ortografio kaj prononcado, kaj pro siaj idiomismoj; aliaj pekas pro aliaj detaloj...

Restas ke koncerne la facilecon Esperanto rajtus havi tri stelojn kaj tiel same ĝi rajtus la samajn tri stelojn por sia neŭtraleco. Sed kiom da steloj niaj legantoj donus al ĝi en la aliaj kolumnoj? Supozeble oni povus doni ankaŭ tri stelojn kaj en la 3-a kaj en la 4-a kolumno; ankaŭ por la 2-a kolumno. Sed kio por la tri aliaj?

Tia kaj simila taksado devus esti tasko por interesitaj interlingvistoj!

A.A.

\*/Michel BRUGUIERE: "Langue et culture françaises". En: Encyclopaedia Universalis, Symposium, p.1020.

\*\*\*\*\*

## DEMANDOJ kaj RESPONDOJ

D.- "Li elektigis fare de la aŭstria popolo". Mi neniam antaŭe vidis tian pasivon en Esperanto. Sed ŝajne tiu novtipa pasivo ekloĝas en nia lingvo, ĉar mi trovis ĉi tiun saman: "Kaj dek tri elcentoj de la Kapitalo de Teknowledge aĉetigis far General Motors!(Luc de Brabandere 1988). Infoduktoj (UEA/BSO, Rotterdam) p.14. Kion vi povas diri pri tia strukturo?(J.Sosniecki).

R.- Jam la uzo de "far" anstataŭ "fare de" estas malrekomendinda laŭ la Oficiala Informo de la Akademio(nova serio n°5 de julio 1986). Sed multe pli grava solecismo, se ne Fundamenta barbarismo, estas la uzo de formoj en "iĝi" anstataŭ la pasivaj formoj. Tion faras ĉiuj, kiuj volas eviti la Fundamentan elekton inter "ita" kaj "ata" participoj: ili detruas vole nevole la unuecon de la Lingvo. La ĝustaj formoj estas: "Li estis elektita de la Aŭstria popolo", "kaj dek tri elcentoj de la Kapitalo de Teknowledge estis aĉetitaj de General Motors!". La uzo de "iĝi" formoj anstataŭ pasivo estas tolerebla nur se oni ne konas aŭ ne volas indiki la aganton, kvazaŭ ĉio efektiviĝus per si mem. Obstini en tia eraro estas minimume rekta subfosado de la lingvaj nuancoj!

J.T.

D.- "Kiam la citaĵo estas neesperanta vorto aŭ esprimo, ekzemple:" John Smith legis "Les Misérables" en la franca lingvo", la manko de akuzativo ne ĝenas min; sed mi kvazaŭ ribelas, se mi aŭdas:" Ili trastudas la "Fundamenta Krestomatio". (Carlos I. de Jesus).

R.- Efektive tia estas la uzado: "La citaĵo gramatike estas ĉiam nevaria" (PAG § 132). Kaj se kompreneble tio ĉi apriore povas ŝoki, eble pro tio d-ro L.L. Zamenhof ĉiam uzis en tiaj okazoj anoncvorton kun akuzativo: "Neniam uzu la vorton "amo"<sup>z</sup>, "tiam uzu la pronomon "oni"<sup>z</sup>ktp. Tial viaj dubaj frazoj klariĝas per unu subkomprenita vorto akuzativa:

a)- Mi legas (la gazeton) "Heroldo de Esperanto" de antaŭ multaj jaroj.

b)- Li ofte konsultas la (libron) "Plena Ilustrita Vortaro".

c)- Zamenhof tradukis la (verkon) "Hamleto".

ĉ)- Mi ofte legas (la libron) "Sankta Biblio", sed la (parton) "Malnova Testamento "nur de tempo al tempo.

d)- Zamenhof subskribis la (tekston) "Deklaracio pri Esperantismo" en 1905.

e)- Zamenhof publikigis la (broŝuron) "Unua Libro" en 1887.

f)- En nia Esperanto-klubo ni kantas (la himnon) "La Espero antaŭ la komenciĝo de ĉiu kunveno.

g)- John Smith legis (la verkon) "Les Misérables" en la franca lingvo.

ĝ)- Ili trastudas la (libron) "Fundamenta Krestomatio".

J.T.

KUN ĈI TIU NUMERO DE " LA LETERO " KOMENCIGAS NOVA JARABONO: NE FORGESU RENOVIGI ĜIN, SE TIO ĈI JAM NE ESTAS FARITA..... DANKON!.

"La Letero de l' Akademio de Esperanto", trimestra informo letero eldonita de "la Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio

Direktoro: André BOURDEAUX Redaktoro: Jean THIERRY Presejo: E 12 C.P.P.P.: n-ro 69710

1 n-ro: 40 FRF Jara abono: 120 FRF. Pagebla ĉe kontoj:

Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris

U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Nordo: S-ro Jan SOSNIECKI, Dalslandsgade 8, M 201 DK-300 Kopenhago S. Danio Poŝta ĝiro: 8 55 56 72

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, TOKYO, 153- Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur. 3493; villa Olimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.